
# *Icap kunvokas virtualan kunvenon Solidareco kontra? la Blokado*

Image not found or type unknown



Havano,  jan 14 (RHK) La Kuba Instituto de Amikeco kun la Popoloj (ICAP) kunvokis la unuan virtualan kunvenon Solidareco kontra? la Blokado, okazonta la 17an de januaro.

En sia Tviter-socia reto, la institucio raportis, ke la gastoj dividos informojn pri la klopodoj de Kubo en la batalo por la konservado de la medio en la evento.

Simile, la ekponantoj emfazos kiel la ekonomiaj, komercaj kaj financaj sankcioj kiujn la usona registaro plu tenas sendifektaj kontra? la kariba nacio subfosas tiun celon.

La renkonti?o okazas meze de kreskanta solidareco kun Kubo de amikaj landoj kaj de kreskanta malakcepto de la internacia komunumo kontra? la blokado.

Lastatempe, membroj de la Nacia Komitato de la Usona Solidareca Brigado Venceremos (Ni venkos) vizitis la landon kaj ?i tie reasertis sian sindevontigon disvastigi la realon de la antila nacio en sia lando, kaj premi por ?esigi la malamikecon de Va?ingtono.

En dialogo kun la amaskomunikiloj, la juna aktivulo Oyensonwu Chatoyer certigis, ke ?i tiu subteno estos konservita dum regos la blokado kaj agreso, plifortigitaj de la Blanka Domo meze de la Kovim-19  kaj la rezultinta tutmonda krizo.

De sia alveno al Havano la 5-an de januaro ?is sia foriro, la usonaj solidarecaj aktivuloj vizitis centrojn de scienca, historia kaj socia intereso en la kuba ?efurbo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/282784-icap-kunvokas-virtualan-kunvenon-solidareco-kontrau-la-blokado

**Radio Habana Cuba**